

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 206 (2019:1)


Jan – Mar 2019

milde
prosperas
nia libroeldonado

La knabo kaj
la lamparino

Babilado kun...
Renata Ventura

Nia memoro
devenas de viruso



54a Brazila Kongreso de Esperanto

39a Brazila Esperantista Junulara Kongreso

2019 - Gojanjo - Gojaso - Brazilo

Informoj kaj aliĝo: www.esperantogoias.com.br



BEL-Konferencoj 2019

Pouso Alegre | 19 – 20 Aprilo



Aliĝo kaj informoj

www.linguainternacional.pe.hu/bel-konferencoj

Loko

Kultura Centro Cleonice Bonillo Fernandes
Praça Senador José Bento, 2 – Centro
Pouso Alegre – MG – Brazilo

Organizas:

Esperanta Ambasadego
Rua Prof. Inácio Loyola Pires, 81
Centro, Pouso Alegre – MG
www.linguainternacional.pe.hu



Aŭspicias:



Brazila Esperanto-Ligo



Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio
Eperantista de Rio-de-Ĵanejro

N-o 206 (2019:1)

Jan - Mar 2019

78-a jarkolekto

Redaktas kaj aranĝas: Allan Argolo

Revizias: Marcionilo Vasconcelos

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Euleax Elias, Fernando Pita, José R.
Tenório, Leandro Silvestre, Luiz Coelho,
Marcionilo Vasconcelos, P.S. Viana,
Renata Ventura kaj Vinícus HPR.

Kovrilo:


© Jorge Royan / Wikimedia Commons


La redaktanto ne respondecas pri la
subskribitaj artikoloj kaj la opinioj
ĉi-tie esprimitaj ne nepre spegulas
la opinion de AERĴ.




Associação Esperantista do
Rio de Janeiro

disvastigo.aerj@gmail.com 

www.aerj.org.br 

facebook.com/aerj.esperanto 

youtube.com/user/TVaerj 

Estraro

Prezidanto: Márcio Santos Nascimento

Vic-prezidanto: Allan Argolo

Financa Direktoro: Aristides Pereira

Sekretario: Tamiris Queiroz

Direktoro pri Disvastigado: Matheus Arantes

Direktoro pri Instruado: Vítor Mendes

Fiska Konsilantaro

Rosana Caraméz, Sédio Langone,
Terezinha dos Santos kaj Gastão Casper.

Enhavo

El la Redakcio _____	4
<i>Babilado kun...</i> Renata Ventura _____	5
Kovrilo: Nia Juvelaro en nova vesto (José R. Tenorio) _____	8
Nova Zamenhofa Biografio (Fernando Pita) _____	10
Nigra Birdo (Marcionilo Vasconcelos) _____	12
Poezia Angulo: Montararbo (Augusto dos Anjos, Trad. Euleax Elias) _____	13
Rakonto: La knabo kaj la lamparino (Vinícus HPR) _____	14
Respekti bestojn ne laŭ-vorte, sed laŭ kondute (Leandro Silvestre) _____	15
Scienco: Nia memoro devenas de viruso _____	17
Anonco _____	19
Raporto _____	20

Kara leganto,

Post longa paŭzo ni reprenas la redaktadon de *RE*. Pro pluraj kialoj, la jaro 2018 estis ege malfacila al la brazila socio. De politika nestabileco ĝis la katastrofa brulego de la Nacia Muzeo, ĉiuj spertis korpemajn sentojn. Ĉe AERJ komplikiĝis la financa situacio, kio postulis luigon de ĝia sidejo. Tial la Asocio portempe ne havas oficialan adreson, kio entute ne malebligas ĝian agadon pri organizado de eventoj kaj kontribuo al la esperanta kulturo. Malgrau ĉio, jen ni!

Sed ne nur bedaŭrindaĵojn alportis 2018: nia movado ĝoje ricevis novaĵojn pri esperanta libro-eldonado en Brazilo.

La pasinta redakcio de *RE* intervjuis la verkistinon Renata Ventura antaŭ longe kaj la rezulton ni oportune prezentas. La samideano Jose Tenorio, el San-Paŭlo, raportas pri sia mirinda projekto *Nia Juvelaro*, kiu celas eldonadon de manarte produktitaj libretoj; Fernando Pita parolas pri la lasta titolo lanĉita de

Esperanta Libro-

klubo: portugala versio de Zamenhofa biografio verkita de Alexander Korjenkov; Marcionilo

Vasconcelos faras recenzeton de la libro *Nigra Birdo kaj aliaj rakontoj*, verkita de la veterano Paulo S. Viana kaj eldonita de EASP.

Pliriĉigante nian revuon, Vinicius HPR regalias nin per magieca kaj imagiga rakonto kaj Euleax Elias konigas la belan tradukon *Montararbo*, de la brazila poeto Augusto dos Anjos.

En la rubriko *Vivstilo*, Leandro Silvestre parolas pri sia veganiĝo kaj en la rubriko *Scienco* vi malkovru ĉu via memorkapablo devenas de viruso.

Fine, ni inaŭguras la rubrikon *Anonco* kaj konigas kelkajn okazintaĵojn en *Raporto*. Bonan legadon!

Allan Argolo



Reagoj

Gratulon! Bela, riĉenhava numero de “Ino Esperantista”

Paulo Sergio Viana, per retmesaĝo.

Brile! Ĉu vi jam legis ĝin?

En la *facebook*-paĝo de Esperanto Asocio de San-Paŭlo.

Gratulinde! O nr. 205 da Revista Rio Esperantista foi dedicado à visão e participação das mulheres no Esperanto. Nepre legu!

En la *facebook*-paĝo de Brazila Esperanto-Ligo



Renata Ventura estas brazila esperantistino kiu diplomiĝis pri ĵurnalismo sed decidis plentempe sindediĉi al verkista kariero. En 2011 ŝi sukcese lanĉis sian debutan libron “*A Arma Escarlate*”, kiu vekis atenton de junuloj kaj plenkreskuloj pro la seriozaj enhavoj kunfandiĝitaj en la magia kaj fantazia universo de Harry Potter en Brazilo.



Rio Esperantista: Renata, parolu ion pri vi mem, pri via verko... Kion vi konsideras rakontinda pri vi?

Renata Ventura: Mi studis ĵurnalismen universitate, sed mi neniam fakte laboris pri Ĵurnalismo. Tuj post la fino de miaj studoj, mi estis invitita labori kun Silvio Tandler, tre grava brazila dokumentisto, kaj mi laboris kune kun li dum 3 jaroj. Tamen tiuepoke mi jam volis verki libron kaj tute ne havis tempon fari tion pro la laborado. Do mi eliris mian laboron kiel dokumentistino por sukcese fini mian unuan libron, nomata *A Arma Escarlate* (La Skarlata Armilo).

A Arma Escarlate estis publikigita je la fino de 2011 kaj la sekva libro, *A Comissão Chapeleira* (La Ĉapelista Komisiono), en 2014. Nun mi verkas la trian libron, *O Dono Do Tempo* (La Mastro de Tempo), kies rakonto okazos en Amazonio!

A Arma Escarlate rakontas pri Hugo, 13-jaraĝa knabo el Dona Marta (favelo en Rio-de-Ĵaneiro), kiu dum forta pafado inter policanoj kaj krimuloj en lia komunumo malkovras, ke li estas sorĉisto kaj havas magiajn kapablojn. Do li forkuras el sia malriĉa kvartalo, celante lerni magion por batali kontraŭ la krimulo, kiu minacas sian familion. Ambaŭ la libroj estas por plenkreskuloj kaj adoleskantoj, ĉar ili, eĉ se per fantazio, parolas pri gravegaj temoj de la Brazila realaĵo kaj ankaŭ pri psikologiaj trajtoj, sociaj kaj politikaj defioj ktp. Samtempe ili parolas pri Brazilo, pri ties riĉa kulturo kaj ties folkloraj rakontoj.

Estos kvin libroj entute en tiu libroserio. Ĉiu el ili okazanta en unu el la kvin regionoj de Brazilo. La unua havas kiel ĉefan rakontlokon la urbon Rio-de-Ĵaneiro (sudorienta regiono de

Brazilo); la dua montras la urbon Salvadoro (nordorienta regiono); la tria, la arbaran nordan regionon Amazonio (en sekreta loko, pri kio mi ankoraŭ ne povas rakonti), la kvara, la sudan regionon; kaj la kvina en Braziljo, la landa ĉefurbo en la centro de Brazilo! En ĉiu libro mi parolas pri la regionaj trajtoj kaj la mirigaj legendoj de la regionoj.

RE: Rakontu al ni: kiel, kial kaj kiam vi lernis Esperanton?

RV: Mi lernis Esperanton, kiam mi estis 18-jaraĝa, inter la jaroj 2003 kaj 2004: Dum du monatoj en Usono, kie mi estis loĝanta, kaj du monatoj en Rio-de-Ĵanejro, kiam mi revenis al Brazilo.

Mia sperto pri la lingvo envere estas interesa. Kiam mi loĝis en Usono, mi havis ideon krei internacian lingvon.

Mi ekplanis ĝin tre entuziasme kaj, ĝuste je la sama tago, amiko de mia patro vizitis mian hejmon kaj diris, ke mi ne bezonus krei internacian lingvon, ĉar ĝi jam ekzistis: Esperanto! Mi treege feliĉiĝis kaj tuj serĉis pri ĝi kaj komencis lerni kun Usona lingvisto, kiu loĝis en Houston, kiel mi.

RE: Vi verkis bonegan (kaj furoran!) libron bazata sur la universo de Harry Potter. En ĝi, Esperanto ludas intereseĝan rolon, kaj tio tre bone funkciis/as kiel propagandilo por la lingvo. Pro tio mi demandas vin:

a) Ĉu la rolo de Esperanto kreskos en la venontaj libroj?

RV: Jes! Esperanto aperas en la unua libro tre rapide, sed ĝi estas tre grava en la dua libro! Pro tio multege da



Renata Ventura kaj la du jam lanĉitaj libroj de sia serio.

legantoj miaj volas lerni Esperanton, kaj mi tre feliĉas pri tio!

Alia tre grava rolulo jam parolas Esperanton en la libroj, sed la legantoj ankoraŭ ne scias. Ili plej eble scios pri tio en la 4-a aŭ 5-a libro!

b) Ĉu vi planas denove inkludi Esperanton en viaj aliaj verkistaj projektoj? (Kompreneble, verkistoj ĉiam havas aliajn projektojn, ĉu ne?)

RV: Jes, jes! Antaŭe ne estis mia plano, sed mi havis interesan ideon por alia libro, kaj Esperanto plejeble estos menciita denove, ĉar gravos fari tion!



c) Ĉu vi planas iam verki ion rekte en Esperanto?

RV: Eble. Mi certe volas, sed mankas tempo por tion fari!

RE: Ĝenerale verkistoj estas ankaŭ furoraj legantoj; do mi demandas:

a) Ĉu vi povus menciĝi aŭtorojn kiuj

influis vin aŭ vian stilon?

RV: Certe J.K. Rowling, verkistino de Harry Potter... kaj Anne Rice, kiu verkis la serion de *Intervjuo kun la Vampiro*. Rowling monstiris al mi, ke eblas babili pri tre seriozaj kaj realaj temoj ene de fantazia libro, kaj Anne Rice instruis min krei tre interesajn kaj profundajn rolulojn, kun gravaj filozofiaj duboj, ktp., eĉ se ili estas vampiroj!

b) Ĉu vi kutimas legi ankaŭ esperantlingvaj verkojn?

RV: Bedaŭrinde mi ne havas tempon eĉ por legi ĉiujn portugala-lingvajn librojn, kiujn mi bezonus legi... Por verki la trian libron, ekzemple, mi devis legi 10 librojn pri Amazonio, pri norda legendoj, pri brazilaj indiĝenoj kaj indiĝena mitologio ktp.! Krom tio, ankoraŭ mi devas legi librojn, kiujn mi volegas legi, pri politiko, pri brazila historio, pri sociologio kaj ankaŭ libroj pri fantazio, ĉar tio ankaŭ estas studo por miaj libroj. Mi amegus havi tempon legi pli da esperantaj libroj, sed nuntempe bedaŭrinde ne eblas...

c) Ĉu iu esperanta aŭtoro iel influis vin?

RV: Envere mi aĉetis kaj komencis legi la esperantan version de *La Mastro de l' Ringoj* kaj *La Hobito*, tradukitaj de William Auld, tre grava esperantisto.

Nia Juvelaro en nova vesto

José R. Tenorio

Pri la ideo

Miriga estas la strebado de esperantistoj, komence de la iniciatinto mem de Esperanto, provizi la lingvon per tradukoj kaj originalaj verkoj. Kaj plej miriga estas la kiomo da verkoj aperintaj en la unuaj jardekoj de la evoluo de Esperanto. Multaj el tiuj verkoj jam fariĝis publika havaĵo, sed oni ne multe atentis ilin nuntempe.

Kion fari por popularigi tiun trezoron? Tio estis la unua sparko kiu venis en la kapon antaŭ kelkaj jaroj. La dua sparko eklumis en 2016 kiam mi vizitis mian naskiĝurbon. En la okazo mi aĉetis dudekon da minilibroj, en la portugala, por regali parencojn kaj geamikojn, kiujn mi ne vidis de kelkaj jaroj. Estis vere agrable vidi la ĝojon sur la vizaĝo de la regalatoj kiam ili malfermis la donaceton. Tiam mi perceptis ke tiaj libretoj allogas ĉiajn aĝulojn kaj eĉ nelegemulojn. Jen perfekta vesto por konatigi nian kaŝitan trezoron!

Pri la celo

La celo de la projekto “Nia Juvelaro” estas unuflanke memorigi esperantistojn pri tiu trezoro, kaj duaflanke disponigi al ili allogan regalopcion por geamikoj kaj

konatoj. Per tiu eta malkaŝo de la esperanta literaturo, oni helpas al la diskonigo de la lingvo kaj eventuale instigos la regalaton lerni ĝin aŭ almenaŭ scivoli en kiu lingvo la libreto estas presita. La ideo estas eldoni cent titolojn en kvin jaroj.

Pri la baroj

La ĉefa baro estis eki la presadon de la libretoj. Tradiciaj presejoj rifuzas mendon de tiaj libretoj (5 x 7 cm) je malgrandaj kvantoj. Tial mi decidis ke, krom fasoni la libretojn, mi mem produktos ilin. Ĉar temas pri laboro manfarita, precipe la bindado, mi bezonis iom fajngigi mian lertecon pri tiu metio. Ne malplie menciinda estas la kurioza malfacilaĵo trovi eventualan kopirajto-gardanton de aŭtoro / tradukinto de esperantaj verkoj, jam forpasinta.



Pri la unuaj impresoj


Ankoraŭ estas frue por taksu la akceptemon de la projekto. Kiam aperos la unua deko da titoloj kaj oni komprenos ke la libretoj, kvankam tute legeblaj, ne celas anstataŭi la kopiojn disponeblajn en la reto (aŭ eventuale ankoraŭ mendeblaj en iu libroservo), sed male diskonigi ilin, tiam ni havos pli klaran bildon pri la antaŭenigo de la projekto.

Pri kiel kontribui al la projekto

Komence la plej kuraĝiga kontribuo, kiun esperantistoj povas fari al la projekto "Nia Juvelaro" estas mendi libreton, ĉu por regali amikon aŭ mem eki kolekton de la etaj juveloj. La libretoj estas mendeblaj ĉe la retejo de la eldonejo Esprima aŭ pere de ĝiaj unuaj partneroj: EASP kaj UEA.


La ideo estas ke la projekto fariĝos

memeldonebla. Alidire, per la vendo de unu titolo eblos subteni la eldonon de nova titolo. Se tiu vojo tamen iel montriĝos ne tiel glata, mi provos starigi kampajnon por mondonaco, kio ne malhelpas eventualan monhelpon nun, se tion volos fari iu ekkompreninta la diversajn eblajn flankojn de tiu eldona projekto.



Ligiloj:

esprima.com.br
easp.org.br/butiko
katalogo.uea.org



Nova Zamenhofa Biografio


Fernando Pita

Nia Majstro mortis antaŭ pli ol cento da jaroj. Tamen, kvankam multaj verkoj estis jam skribitaj pri lia vivo, nur kelkaj el ili donas sufiĉan atenton al esplorado, ĉe liatempaj dokumentoj, pri atestigataj informoj pri la homo Zamenhof. Tiu *ne* estas la kazo de *Homarano – La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Rezulto de esplorado komencita ankoraŭ dum la 70-aj jaroj en tiama Sovetunio, la libro de nia granda aktivulo Aleksander Korĵenkov, redakciestro de la grava revuo *La Ondo de Esperanto*, alportas por ni gravajn kaj tre surprizigajn informojn.

Danke al lia nelacigebla esplorado, multo el tio kion ni pensis scii pri Zamenhof kaj lia familio ricevas grandan reviziadon – ĉiam bazata sur dokumentoj trovitaj en la urboj kie li kaj liaj familianoj vivis. Komencante de lia nomo mem, kiu neniam estis Lazaro Ludoviko... al la speciala juda kondiĉo de liaj familianoj. Tiu libro iamaniere *mal-* kaj *re-*konstruas ĉe ni la ĝeneralan bildon pentrita de la Majstro en diversaj aliaj verkoj.

Krom tio, la verko elmontras – ja didaktike – la kompleksega mozaiko de interretnaj kaj interreligiaj rilatoj

de la tempo kaj loko(j) kie Zamenhof vivis, kio al ni permesas munti pli klaran panoramon pri la motivo de liaj ideoj. En tiu mozaiko, specialan atenton ricevas lia juda kultura heredaĵo, kaj kiamaniere tio influis lian personan (kaj publikan) rilaton kun lia tiama socipolitika, ekonomia, kultura ĉirkaŭaĵo: ĉar la vivo kaj pensaro de Zamenhof estas tute nedisigeblaj de tio, ke li estis “hebreo



Zamenhof: vida, obra e ideias do autor do Esperanto,
Alexander Korĵenkov.
Eldonejo Temática/ELK,
Porto Velho, 2018.

el la ghetto” kaj, observataj el tiu vidpunkto, ĝi ja akiras tute novan signifaron, komplete malsama ol tiu de la “malriĉa oftalmologo el Varsovio”. Tiu situacio, kiu dum jardekoj homoj – precipe movad-estraranoj – intence neglektis, estas la ŝlosilo kiu al ni permesas komplete interpreti la veran sencon de tio, kion ni kutimis nomi *interna ideo*.

Kaj kompreno, en ĝia preciza mezuro, de tiu interna ideo, estas io vere necesa por tiuj kiuj ja deziras fariĝi, pli ol nur esperanto-parolantoj, anoj de la esperanto-kulturo.

Tio supradirite estas ĝenerala skizo, rapida kaj pro tio nesufiĉe komplete, de la resuma, portugallingva versio de la libro de Korĵenkov: *Zamenhof* –

vida, obra e ideias do autor do Esperanto. Lanĉita de la Esperanto Libro-Klubo, kies celo estas disponigi librojn por disvendado en niaj kluboj kaj asocioj, speciale AERĴ, la libro celas atingi kaj komencantojn kaj la neesperantistan publikon; tiel, krom la biografio mem, en ĝi estas unu-dupaĝaj tekstetoj kun ĝeneralaj informoj pri nia movado kaj kulturo, plej ofte rilataj al la temo de la ĉapitro mem.

Koni la vivon kaj ideojn de tiu, kiu donis al ni la lingvon amatan, estas unu el la plej bonaj manieroj omaĝi la Majstron. Tiel, ne maltrafu tiun oportunon, aĉetu ĉe AERĴ kaj donacu al viaj “esperantigotaj” amikoj tiun libron, sendube “la nepoj vin benos”!



EVENTA
SERVO

DISKONIGU
ESPERANTAJN
EVENTOJN
TUTMONDE

EVENTASERVO.ORG

Nigra birdo kaj aliaj rakontoj

Marcionilo Vasconcelos


Nigra Birdo; jen atentokapta bildo kiun Paulo Sérgio Viana elektis por sia libro kaj por la titolo de la unua ĉapitro de tiu libro kies enhavo ĉiam prezentas, verŝajne ordinarajn, tamen pripensigajn okazaĵojn, situaciojn kaj etoson en ĉiu rakonto.

Temoj kiaj libereco, memkono, homaj rilatoj, psikologiaj defioj, krom multaj aliaj, estas pritraktataj en ĉiu ĉapitro. La libro estas konstruita kiel mensa puzzle. Ĉiu parto estas sendependa unu de la alia, tiel ke vi povas legi ekde de la komenco, de la mezo aŭ de la fino, sed entute ĝi prezentas diversaj flankojn de la sama “objekto”, la homo.

Paulo Sérgio Viana sukcesas el etaj aferoj konstrui longajn vojojn al nia memo. Kiel ekzemplo de tio, ekde la unua ĉapitro, “La nigra birdo” ebligas al ni malkonstrui nian propran perspektivon pri besto kiu, unuavide, alvokus tenebrajn pensojn, sed aspektas fine kiel simbolo de sufero, ne pro siaj propaj kvalitoj, sed pro la valoro kaj sinteno de homo rilate al ĝi. Nigra kiel nia “nekonscio”, jen la birdo, sed ĉiam eblas liberigi ĝin por permesi la flugon al la ĝuo de la vivo kaj naturo,

jen nia flugo kiel homaj estaĵoj malliberigitaj de tiom da dilemoj, antaŭjuĝoj, ktp.

En ĉiu parto de tiu libro, eblas konstati ke la sintezo-kapablo de la verkinto permesas nin flugi en nia propra memo per verŝajne simplaj aferoj. Ek al legado kaj al subkonsciaj flugoj de nia memo.



Nigra birdo kaj aliaj rakontoj,
Paulo Sérgio Viana.
EASP, San-Paŭlo, 2018.

Montararbo

Augusto dos Anjos (Árvore da Serra)

Tradukis: Euleax Elias Pereira

— La arboj, ho ido, ne havas animon!

Kaj tiu ĉi arbo estas al mi baro...

Oni devas ĝin haki, do, mia ido,

por, ke mi havu maljuno-karon!

— Paĉjo vi mia, kial via kolero ne trankviliĝas?!

Ĉu vi ne vidas en ĉio la saman brilon?!

Dio metis animojn en cedrojn... en jonkvilon...

Tiu ĉi arbo, paĉjo vi mia, posedas mian animon!...

Diris genufleksonte por prediko:

“Ne murdu la arbon, paĉjo, por ke mi vivu!”

Kaj kiam la arbo, rigardante la patrujan monton,

Falis per frapoj de malklera hakilo,


La trista fraŭlo ekbrakumis la trunkon

Kaj neniam plu sin levis el la grundo!

Ilustraĵo el la bildstria versio de la poemo *Árvore da Serra*.

Artisto: Mike Deodato.

Fonto: issuu.com/euaquadrado/docs/arvoredaserra



AUGUSTO DOS ANJOS

QUADRIZAGÃO:

Mike Deodato

COLORIZAÇÃO:

Muñido

La Knabo kaj la Lamparino

Vinícius HPR

Iam, la knabo Orio havis nenion por fari, li ekmarŝis tra la insulo kie li loĝis. Post kelkaj paŝoj li trovis Lamparinson, tiu kiu kunportas la dormecon al la Homaro, kuŝantan sub bela arbo. En ĝia mano estis sako, en kiu troviĝis la dormecpolvo kaj sen pensi Orio provis tion ŝteli. Tamen, eble pro la manko de kutimo, Lamparino vekiĝis kaj trovis sian sakon en la manoj de la ŝtelisto. Tiam, ĝi frapis la vizaĝon de la infano, reprenis la sakon kaj tuje diris la jenajn vortojn: *Vi provis ŝteli karegan ilon de mi, kaj nun mi forprenos iun karan ilon de vi. Ekde hodiaŭ neniu lamparino vizitos vin, ne estos eble al vi dormi aŭ ripozi, ĉar mi de vi forprenas la dormecon!*

Maltrankvile, Orio kuris sen kredi ĉu tio povus esti vero. La nobla knabo sidiĝis atendante la dormecon, sed nenio okazis. Pasis la horoj, la tagoj kaj la noktoj. Li laciĝis sed tute ne sukcesis dormi! Orio provis serĉi ĉirkaŭ la brakoj de sia patrino la dormecon, tamen, eĉ en la plej bona loko de la mondo, dormeco ne vizitis lin. Suplikante, Orio alvokis Madron, la Sinjoro de la morto kaj sonĝoj, kiu kompateme volis helpi lin. Li donis al la malfeliĉa knabo harpon, etan

harpon, kiu devus esti ludata nur de la lamparino kiu malbenis lin, kaj neniu plu rajtus tion fari! Tiele, ĉio estus denove kiel estis antaŭe.

Orio marŝis, marŝis kaj marŝadis, sed nenion trovis li. Ekde tiu tago, neniu lamparino aperis en la insulo. Verŝajne ĉiuj mokis pri la malfeliĉo kiu kovris la knabeton. Lace, la knabo provis ludi la harpon, malobeis li tiele la regulojn de la Sinjoro, tamen, kio povus okazi?

Unua noto, duaj notoj, triaj notoj, je ĉiu sono kiu eliris de la muzikilo, la knabo ekripozis. La okuloj fermiĝetis, fermiĝetis kaj finfine li falis en bonegan dormecon! Kiel oni povas supozi, nenio estus tiom simpla, ĉar Orio malobeis la Sinjoran regulon kaj pro tio li ekkriis. Ekkriis li pro la kialo ke, ĉirkaŭ la merita dormeco estis neniu sonĝo. Orio ludis la malĝustan muzikon kaj la harpo donis al li nur koŝmarojn. Pro la manko de sonĝoj, la knabo multe laciĝis, maljuniĝis kaj ege rapide ekhavis teruran vizaĝon. Li forprenis ĉiujn harojn de sia kapo, gratadis sian korpon, kovrante ĝin per sango. Li tute ne bezonis plu uzi vestaĵojn, ĉar la ruĝa koloro lin bone vestis. La teruraĵo estis tiom granda ke la eta

knabo tute ne distingis la realecon de la koŝmaroj. Ĉio estis en la sama loko. Sen esperoj, Orio multe suferis kaj decidis meti finon al sia doloro vivi. Li kuris ĝis la granda abismo kaj tie ĵetis li sian korpon maren.

Kiam la korpo tuŝis la maron, la kompatinda knabo troviĝis sub bela

arbo, lia vango tute doloris kaj antaŭ li, kun griza rideto, estis la lamparino kiu faris ĉion. Orio ne multe komprenis, tamen iom post iom, ĉio klariĝis. Tiam, kiam li provis ŝteli la sakon de la lamparino, ĝi frapis lian vizaĝon, tuj Orio svenis kaj ĉio, kion li vivis, estis nur simpla koŝmaro.

Vivstilo

Respekti bestojn ne laŭ-vorte, sed laŭ kondute

Leandro Silvestre

Dum iom pli ol 2 jardekoj, mi estis viando-maniulo; oni emas “forgesi” la procezon laŭ kiu tiu “manĝaĵo” estas produktata. Ekde mia infanaĝo, mi amas bestojn, sed kiam mi konatiĝis kun vegetaranoj kaj veganoj – danke al Esperanto –, mi decidis, ke mi diros, ke mi ilin amos nur kiam mi veganiĝos, alie mi estus hipokritulo.

Komence, kiam veganoj argumentis pri Veganismo, mi kontraŭstaris, mi pensis, ke mi mis-nutriĝos sekvante tiun vojon – Ĝis kiam mi konstatis, ke mi simple papage ripetis, kion diras homoj cerblavitaj de la gigantaj industrioj, kies profito dependas de ekspluatado, sango-elverŝado, toruturo kaj sufero de senkulpaj sentivaj estuloj.

Ekvolinte ŝanĝiĝi, mi cerbumis kiel venki mian manion; iam mi ek-pensis la jenon “Mia gusto ne pli gravas ol ilia sufero”. Tiam, mi ĉesis manĝi mamulojn, tamen mi tute ne sciis, kion manĝi anstataŭ birdoj, fiŝoj, ovaĵoj kaj laktaĵoj.

Okaze de vizito de Vinĉjo (juna esperantisto el *Campos dos Goytacazes*, RJ) al mia urbo, li invitis min al Budhista Templo; tie okazis prelego kun senpaga tagmanĝo post ĝi. Mi supozis, ke ni manĝos viandon kompreneble. Ekvidinte du longajn tablojn, mi ne trovis iun ajn bestaĵon! kuŝis sur ili diversaj manĝaĵoj, kiujn mi neniam vidis ĝis tiu tago.

Ili ege plaĉis al mi, kaj mi diris al nia kara samideano “Ĉar estas tiom da opcioj, mi pretas daŭre paŝi

antaŭen en mia transiro kaj veganigi”.

Mi rimarkis ke preskaŭ ĉiuj unanime admirindaj homoj estas vegetaranoj, kiel Plato, Sokrato, Gandhi, Budha, Krishna, Albert Schweitzer, Leonardo da Vinci, Volterio, Tolstoj, Cesar Chaves, Pitagoro kaj aliaj; aŭ manĝis malmulte da viando kiel Madre Teresa, Chico Xavier (en la libro *Entender Conversando* li afirmas, ke li ŝanĝis sian dieton al ovo-lakto manĝado de 200 gramoj). Ĝenerale, bonuloj ne estas alkroĉitaj al la kutimo senkompatate trakti bestojn, kiu ja bezonas nian zorgadon.

Eĉ estis teksto atribuita al Zamenhof pri lia Vegetarano, kiu mistere estis sabotita...

Dum 2 jarojn mi ankoraŭ manĝis ovaĵojn kaj laktaĵojn, sed mi trovis, ke la industrioj respondecantaj pri ambaŭ, ĉefe la dua, estas des pli kruela ol tiu de viando; fakte ili estas unuaĵo.


Kaj la bona novaĵo al tiuj kiuj sopiras la guston kaj la aspekton de viando, estas, ke eĉ disponeblas “vegetaĵaj viandoj”, kies gusto ne eĉ ĉio-manĝantoj kapablas distingi inter ili kaj la viandoj el besta karno. Eblas

kaj mendi, kaj pretigi ilin hejme. Memortenu, ke la sekreto pri saporo troviĝas en la **spicoj**; neniu manĝas viandon ne-spicitan – parenteze, per veganaj spicoj –; do, vi miros pri kiom atingebblas per sojo, tofuo, kinoo, aveno, kikero kaj aliaj manĝaĵoj, kiuj estas alkalkulitaj al la listo de la plej sanaj en la mondo. Eĉ laktaĵojn kaj ovaĵojn eblas imiti.

Mia nuntempa manĝ- kaj trinkmenuo estas ege **varia**, **malmultekosta**, **bongustega** kaj **nutra**. Antaŭe mi dependis de kadraĵoj de 4 bestoj, kiuj enhavas karnon, tendenojn, venojn, muskolojn kaj sangon.

Hodiaŭ, mi plen-rajtas diri al bestoj, ke mi ilin amas, kaj pardonpetas pro la jaroj da nesciado. Bedaŭrinde, abundas homoj, kiuj – parafraze de Zamenhof – “kontraŭ la argumentoj de la defendantoj de la nova ideo fermadis sian cerbon per la plej fortikaj seruroj”.





Nia memoro devenas de viruso

Kiel nia memoro funkcias? Jen demando kiu de jardekoj laborigas neŭrosciencistojn. Oni scias ke al memorkapablo rilatas kompleksaj procedoj kaj pluraj cerbo-sistemoj. Je molekula nivelo, ene de la cerbo, proteinoj ne restadas dum pli ol kelkaj minutoj. Malgraŭ tio, memoroj povas persisti dum nia tuta vivo.

Pasintjare, internacia esplorgupo kun membroj el Usono, Danio kaj Anglujo malkovris kuriozan aferon pri proteino nomata Arc, kiu esencas por longdaŭra memoro, laŭ antaŭa scio. La novaĵo: ĝi havas tre similajn trajtojn al la maniero kiel virusoj infektas ĉelojn.

En artikolo publikigita en la revuo *Cell*, la esploristoj verkis ke “La neŭrona geno Arc estas esenca por longdaŭra konservado de informoj ĉe

mamulaj cerboj, ĝi peradas variajn formojn de sinapsa plasteo, kaj estis alligita al neŭrodisvolvaj malsanoj”. Tamen, “malmulton oni scias pri ĝia molekula funkcio kaj evolua origino”.

Pro la studo, esploristoj kredas ke la ĉefroleco de Arc en la memor-funkciado rezultas de hazarda renkonto okazinta antaŭ milionoj da jaroj.


Per elektro-mikroskopio, oni atente pristudis la proteinon kaj konstatis ke la maniero kiel Arc kuniĝas ege similas al la maniero kiel la HIV-retroviruso funkcias.

Esploristoj estis kaptitaj de la ideo ke proteino povus agi kiel viruso kaj ludi kiel platformo por inter-neŭrona komunikado. Alivorte, Arc malfermas fenestron tra kiu memoroj

povas solidiĝi kaj sen Arc, tiu fenestro ne malfermeblas.

En antaŭaj studoj, musoj sen la proteino Arc havis malmultan cerbplastiĉo kaj ne sukcesis memori okazaĵojn de antaŭaj 24 horoj. Sed neniu estis sugestinta mekanismon kiu imitas agojn de fremdaj estaĵoj.

Oni nun kredas, ke la antaŭulo de retroviruso, la retrotransposono, injektis sian genetikan materialon antaŭ 350-400 milionoj da jaroj en 4-pieda ter-besto. Laŭsupoze, tio kondukis al la disvolviĝo de Arc-proteino, kiel ĝi funkcias en nia hodiaŭa neŭrokemio.



La HIV-kapsido konsistas el proksimume 2000 kopioj de la proteino p24. Fonto: *Thomas Spletstoesser, Wikimedia Commons.*

La malkovro estas ke Arc agas kiel virusa kapsido, la proteina ŝelo de viruseroj kiu konservas en sia eno virusajn genetikajn informojn. Do,

viruso uzas la kapsidon por disvastigi sian genetikan materialon de ĉelo al ĉelo, okazigante infektadon. Siavice, Arc enkapsuligas sian RNA por transporti ĝin el unu neŭrono en alian.

Tiu esploro nun ŝanĝas la manieron kiel oni komprenas la evoluan procedon. Anstataŭ hazardaj mutacioj, estas sugestite ke organismoj eble pruntas el aliaj cele al disvolviĝo. Por testi la teorion, la esploristoj elpensis serion da eksperimentoj por kontroli ĉu Arc funkcias kiel viruso aŭ ne.

Oni do malkovris ke la proteino replikadas sin en kapsidoj, kiuj konservas la mesaĝistan RNA (mRNA). Sekve oni transprenis la kapsidojn al petri-pladoj enhavantajn musajn neŭronojn kaj oni observis ke Arc transmetis sian mRNA de unu al alia neŭrono. Ŝajnas ke neŭrona aktivado ekigas pli da Arc-proteinojn, okazante la liberigon de pli da kapsidoj, kaj do okazadas domena efiko.

Tradukita kaj adaptita el la artikolo *Our memory comes from an ancient virus, neuroscientists say.* PERRY, Philip.

Fonto: bigthink.com/philip-perry

TEO, AMO kaj MONDO

Tianjin-a Esperanto-Asocio, Asocio por Popularigo de Hangzhou-urbo kiel Te-urbo kaj Tianjin-a Universitato de Scienco kaj Tekniko:

Lanĉas novan agon por Teo, Amo kaj Mondo!

Celoj de tiu nova ago estas plivastigi Esperanton, amikiĝi kun teŝatantaj esperantistoj kaj teaj profesiuloj kaj per fotoj kaj videaĵoj pere de TEO montri diferencojn kaj similecojn de la mondo.

Kontribuu per fotoj kaj videaĵoj:

Fotu/filmu interesajn okazojn, eventojn, personojn, vidindaĵojn, konstruaĵojn... pri TEO, skribu nomon, lokon, informon pri fotita/filmita persono (se estas iu sur la foto) kaj rakontu pri via foto/video.

Ĉiuj gajnintoj ricevos libron pri teo: “Teo kaj Amo: Rakonto pri Teo” aŭ “Rakontoj pri Ĉina Teo”.

Limdato: la 30-a de junio, 2019.

Pli detalajn informojn legu [ĉi tie](#).

Ni kune agu por Esperanto!



Komuna Loĝejo dum BKE

Ni ĝojas anonci la komunan loĝejon por la Brazila Kongreso de Esperanto kaj Brazila Esperantista Junulara Kongreso en Gojanjo/GO!

Ĉi-jare, la komuna loĝejo lokiĝos ĉe Hotel Metròpole, kiu distancas je nur 15 min. piedire de la kongresejo.

Depende de la ĉambro elektita, vi povas havi loĝejon dum la kongreso kontraŭ nur R\$ 135,00! Krom tio, junaj membroj de BEJO havas rabaton de R\$ 35,00!

Sed ne malŝparu tempon: la loko estas limigitaj!!! Iru al bit.ly/klbejk19 por plenumi la aliĝilon.

AERĴ volas scii pri vi

Kun la celo pli bone koni kaj scii kie estas la esperantistoj de la ŝtato Rio-do-Ĵaneiro, AERĴ lanĉis simplan kaj rapidan demandaron.

Unu el la celoj de la esploro estas identigi kiuj estas la bezonoj de esperanto-movado en la ŝtato kaj havigi informojn por strategie pensi la plej bonajn lokojn por esperanto-eventoj kaj kiuj tipoj de evento plej allogas la publikon.

Plenigo de la demandaro daŭros nur proksimume 1 minuto, kaj oni povas tion fari pere de la ligilo <https://goo.gl/i5fcBQ>. Personaj informoj ne estos publikigitaj.

Kultura Esperanto-renkontiĝo en *Petrópolis*

Kennya Torres

En la 19 de majo de 2018 okazis la 29-a Esperanto Renkontiĝo de la Ŝtato Rio-de-Ĵanejro. La neregistara organizo *Casa da Cidadania* (Domo de Civitaneco), en montara urbo *Petrópolis*, gastigis la eventon sub la temo “Esperanto en lokoj de kulturo”. En la komenco, Alcione Koritzky, kiu profesie laboras pri kultura produktado, tre klarige prelegis pri la rilato inter sia fako kaj la eblecoj por la esperanto-movado, tiel ke oni ne devas enfermiĝi en la lingvo-instruado, sed ankaŭ ligiĝi al kulturo en esperanto, ĉu per muziko, murpentraĵoj, artoj ĝenerale. En la sekvo, Tânia Paixão kaj Dirce Sales prezentis mallongan kaj amuzegan teatraĵon kaj Fernando Maia prelegis pri la projekto “Kulturaj Provokoj”, kiun li disvolvis kune kun KarEJO, kaj atentigis pri la graveco de ĝia kontinueco.

Post la tagmanĝo, Francisco José parolis pri la rilato inter Esperanto kaj la ideo de libera programaro, montrante pluraj konceptojn, kaj

proponis la uzadon de libera programaro en esperanto-asocioj por produktado kaj cifera atestigo de dosieroj. La samideano Fábio Silva parolis pri sia laboro en la urbo Pouso Alegre per dulingvaj ŝildoj kaj stratŝildoj (en la portugala kaj en esperanto) kaj ankaŭ per la produktado de amuzaj kaj modernaj esperantaĵoj.

Preskaŭ en la fino okazis magia muzika momento per la gitaro de la Samideano Victor Mendes kaj la voĉo de lia fratino Selma Mendes, kiu plenanime kantis belajn kanzonojn en esperanto. Laste sed ne balaste, okazis la formaligo de KarEJO, la karioka esperantista junulara organizo, kiam la junuloj refoje prezentis la organizon, kaj siajn projektojn.

Dum la tuta evento funkciis la libroservo de AERĴ kaj la budo de Sekreta Frataro, kun pluraj esperantaĵoj.



Vintra Aranĝo en Paraty

Gabriel Baltazar *

Partopreni en la 5-a eldono de la Vintra Aranĝo de BEJO estis neforgesebla sperto. Tiu estis mia unua ŝanco sperti veran imersion en Esperanto. Unu el la plej interesaj aferoj estis pli bone kompreni ĝeneralajn aspektojn de la lingvo (kiaj fonetiko, gramatikaj reguloj kaj similaj aferoj). Sed antaŭ ĉio, estis speciale bone senti la idealon de Esperanto kaj koni personojn kiuj engaĝiĝas kun la lingvo. Mi sentis min tre bone akceptita kaj inkluzivigita de ĉiuj kaj intencas daŭre resti en kontakto kun ili.

La programo estis bonega kaj inkluzivis gastronomiajn, historiajn kaj aventurajn promenojn. Mi sentas kvazaŭ mi sukcesis koni ĉion plej interesan en la urbo Paraty. Mi reliefigas ankaŭ la kialon de tiom speciala sento promenadi kun esperantistoj: diverseco. Mi sukcesis

percepti ke la parolantoj de la neŭtrala lingvo formas tre diversan komunumon, kiu estas tolerema kaj akceptema.



Mi revenis de la vojaĝo al Paraty entuziasmiĝinta por pli bone lerni Esperanton kaj jam konvinkis aliajn amikojn kunlerni kun mi. Ni pritraktas tion kun la esperantistoj de nia urbo (Kuritiba-PR) por pli kaj pli engaĝiĝi en la loka movado.

Fine, mi sentas ke mi sukcesis kompreni plurajn idealojn de Esperanto kaj pensas ke mi ekkomprenis la sencon de la frazo ligita al esperantistoj, la “civitanoj de la mondo”. Ĝenerale, mi amegis la VINA-sperton kaj mi certe partoprenos ĝin denove se mi havos oportunon.

* Gabriel estas estas studento de biomedicino (UFPR) kaj raportis en la portugala.



Renkontiĝo en Paraíba Valo

Luiz A. Coelho kaj P.S.Viana

Je la 18-a de novembro 2018 okazis unu plia entuziasma Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba Valo - regiono inter Rio-de-Ĵanejro kaj San-Paŭlo, kie situas la viglaj Esperanto-grupoj. Ĉi-foje, en la urbo Paraíba do Sul, en ĉambroj de municipa lernejo, sub gvido de Luiz Alberto Coelho, loka veterano. Partoprenis trideko da samideanoj el naŭ urboj. La eventon aŭspiciis Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro.

En la programo, oni prezentis prelegojn pri *La Origino de Demokratio* (P.S.Viana), pri *La Kvin Fazoj de la Esperanta Literaturo* (F. Pita), pri *Guto da Gramatiko* (P.S.Viana) kaj pri *Investado je Krudaj Varoj* (J. Linck).

Okazis ankaŭ diskutoj pri SAT kaj pri la Esperanta komunumo. Oni prezentis enkondukon de la lingvo al novuloj, pere de lingvaj ludoj (Vitor Mendes). Krome, oni variatis per pluraj kantoj en Esperanto, fare de Miguel Klav, Dirce Sales (kiu lanĉis novan kanzonon originale verkitan en nia lingvo) kaj Tânia Paixão (kiu krome proponis etan pantomimon vestite kiel Chaplin). La tuta etoso estis tre entuziasma. Dum la evento funkciis eta libroservo kaj budeto de Esperantaĵoj.

Evento en Legio de Bona Volo

P.S.Viana

La 27-an de februaro 2019 okazis en la sidejo de Legio de Bona Volo (LBV) en San-Paŭlo, vigla evento. Por tio alvenis el Rio-de-Ĵanejro tri gejunuloj el la estraro de KarEJO - la loka Junulara Esperantista Organizo: Tamiris Queiroz, Matheus Arantes kaj Anderson Delgado. Ĉeestis ankaŭ tri reprezentantoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

Matene, la Esperantistoj vizitis la instalaĵojn de la granda lernejo, kie studas 1500 infanoj kaj junuloj. Akompanis ilin la oficistoj en la departemento de Esperanto de tiu institucio. Ili tagmanĝis en la komuna restoracio. Posttagmeze, la reprezentantoj de KarEJO dum tri horoj prezentis Esperanton al grupo da sepdek LBV-lernantoj. Tamiris kaj Matheus parolis pri la historio kaj celoj de Esperanto kaj Anderson transdonis bazajn informojn pri la gramatiko. La publiko entuziasme reagis.

Estas notinde, ke de iom da tempo LBV ĉiujare invitas Esperantistojn por tiaspeca informado pri Esperanto en sia sidejo, en San-Paŭlo. Krome, publikiĝas en ĝia interreta portalo informo pri la evento.

XXI

Treinamento de Instrutores de Esperanto

6 de abril de 2019

das 8h30 às 17h

local: **Cooperativa Cultural dos Esperantistas (KKE)**

inscrição: <https://goo.gl/ypqsnu>
sócio AERJ/KKE: R\$10,00
não-sócio: R\$20,00



organização



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni, 135/302
Centro, Rio de Janeiro
www.aerj.org.br | disvastigo.aerj@gmail.com



apoio

Cooperativa Cultural dos Esperantistas
Av. 13 de Maio, 47, s/l 208
Centro, Rio de Janeiro
(21) 2544-4314 | www.kke.org.br



EKO-MUZEO SEPETIBA



7-A DE ABRIL

KULTURA PROVOKO + LUDO + KUNMANĜO

Praça Washington Luís - Sepetiba
Dimanĉe 9h00



30^a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Janeiro

Rio-de-Janeiro | sabato, 18-a de majo 2019

Virinoj de Esperantujo

Renkontejo:

Colégio Estadual Leopoldina da Silveira
Rua da Feira, 77, Bangu – Rio de Janeiro

Informoj kaj Aliĝoj:

aerj.org.br/encontro-estadual

Organizaĵo:



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni, 135/302, Centro – Rio de Janeiro
www.aerj.org.br | disvastigo.aerj@gmail.com